

LA VERDA LUPEO



Informilo de ELF/AREK

Aprilo 2017

(49a jaro)

N-ro 174

Esperanto Ligo Filatelista /Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Redakcio: Rudolf Burmeister Max-Müller-Str. 86 DE 09123 CHEMNITZ



Jubilea E-ipm el Koreio, 2012




Korea E-ipm 2011



La grafikisto de la simbolo por la 64a Kongreso de Kansai-Esperantistoj, s-ano NISIMORI, Kimio klarigis al la japana informilo „La Movado, 786“ paĝo 2016.8 la diversajn simbolaĵojn en la kongresa simbolo:

- 1) La tuta bildo montras figuron de ni, esperantistoj, kiuj celas idealan Estontecon.
- 2) Tiu parto montras stelon, la simbolon de nia lingvo.
- 3) Jen troviĝas la granda tombo-ŝtono (de imperiestro Nintoku) laŭ stilo de *zempo-koenfun*, en la urbo *Sakai*
- 4) Japana litero „ト“, kiu estas parto de simbolo de la urbo *Tondabajaŝi*
- 5) Krome en la bildo oni povas trovi ĉiujn literojn el la alfabeto de Esp.




A

B

C

Ĉ

Dankon al Haruja Maekaua pro la sendita kopio de la paĝo!



**Germanio 2009, Tutaĵo-poŝtkarto, 45 eŭro-cendoj
kaj Tutaĵo-koŭerto, 55 eŭro-cendoj,
kun teksto en la pm: SERVO PER AMIKECO
Informis: s-ro Horst DEITRICH**



Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio en Seulo, 2011



Aperis: 6a de Oktobro 2011
Nominalo: 250 Won (uono)
Variaĵo A: Verda nominalo
Eldonkvanto: 180 pecoj en 30 folietoj kun po 6 ipm
Informis: KANG, Hon gu

Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio en Seulo, 2011



Aperis: 6a de Oktobro 2011
 Nominalo: 250 Won (uono)
 Variaĵo A: Ruĝbruna nominalo
 Eldonkvanto: 400 pecoj en 20 folioj kun po 20 ipm
 Informis: KANG, Hon gu

125 Jaroj Esperanto 1987 – 2012



Aperis: 2012
Nominalo: 270 Won (uono)
Eldonkvanto: 180 pecoj en 30 folioj kun po 6 ipm
400 pecoj en 20 folioj kun po 20 ipm
Informis: KANG, Hon gu

Estimata sinjoro Kang,
NI kore dankas al vi pro viaj senditaj informoj!





Kaj ambaŭ dekfolioj ankaŭ nedentumitaj.

La tuto ofertita kontraŭ 10 euroj en reta aŭkcio en Decembro 2016.

Malbonodora ekzemplo pri nunaj teknikaj eblecoj.

Novbakitaj E-filatelistoj certe akirus tiun tre bonprezan oferton, sed ricevus rubaĵon.


Ne unuafoje videblis en ret-aŭkcio iuj strangajoj. Ekzemple ofertita pasintjare estis tiu sendenta jugoslavia jubilea pm, ĝi eĉ trovis aĉetanton en PR Ĉinio...

Ĉijare denove aperis reta oferto pri ĝi...




Kaj – kion diri pri ĉi hispania „tutaĵ-pk“ pri nia s-ano Selten?

Ofertita ĝi estis kun abundo da aliaj pk-oj pri nobelpremiitoj antaŭ du-tri jaroj!




Esperantlingvaj propagandaj bildkartoj el la Hispania Milito

Nia kolego James Rezende Piton dum retumado malkovris vicon da propagandaj bildkartoj kun E-lingvaj tekstoj, eldonitaj de la defendantoj de la hispania respubliko. Iujn ni montras, ĉar al mi tiuj estis nekonataj. Kaj certe same al vi.




Adresflanke presita E-lingva teksto:


„Alcatá Zamora, unua Prezidento de la Respubliko, perfidante la maldekstra(jn) partiojn kiuj levis lin al la Prezidenteco, donas la povon al la dekstraj partioj. La popolo leviĝas armite kaj la asturiaj ministoj skribas unu el la heroaj paĝoj de la batalo por la hispana revolucio.“



„La februaraj balotadoj, fare de la dekstraj partioj, donas grandegan plejmulton al la defendantoj de la popola afero, malfermante la malliberejojn kie miloj da laboristoj estis suferintaj dum pli ol unu jaro la plej severan kaj barbaran reakcian punadon.“



„Ferrer, apostolo de la libereco, estas pafmortigita de la reakcio kiel venĝo al la ribelo de la popolo proteste kontraŭ la Afrika milito. „



„Fermi Galán kaj García Hernández, antaŭuloj de la Respubliko, falas mortpafitaj per la plumbo de la dungitaj murdistoj de monarĥo brutigita kaj ekskluzive defendanto de idiaj privilegioj.“

D-ro Albin Möbusz, aŭtoro de E-a sigelmarka katalogo (1912)

Tre estimata sinjoro, inter la de vi senditaj specimenoj de la Zamenhof-markoj (eld. de Kocourek, Wien) mi ĵus trovas hazarde kelkajn diferencojn. Ekzistas nome 2 diversaj specoj: „Aŭtoro“ kaj „Autoro“ (la „u“ kun kaj sen hoko - supersigno). De Kocourek mi ricevis sen supersigno nur: oran, verdan-argentan, verdan-oran kaj ruĝan-rozkoloran markojn. La ceteraj al mi mankas. Do mi mendas de vi po 100 de ĉiuj aliaj „Autoro“-markoj. Estas la jenaj: verda sur blanka, verda, flava, rozkolora;
 ruĝa " " " " ; ~~roz~~
 blua " " " " violkolora.

Altestime
 D. Albin Möbusz

Lübeck, 5.X.13.

Li, E-isto ekde 1901, estis pasia kolektanto de E-aj sigelmarkoj kaj 1912 eldonis E-sigelmarkan katalogon. Li verkis E-lernolibron, pri ĝi ekzistas propaganda glumarko. Ĉe nia amiko Amoureux kuŝas poŝtkarto sendita de li el Lübeck, 5.X.1913 kun teksto:

„Tre estimata sinjoro, inter la de vi senditaj specimenoj de la Zamenhof-markoj (eld. de Kocourek, Wien,) mi ĵus trovas hazarde kelkajn diferencojn. Ekzistas nome 2 diversaj specoj: „Aŭtoro“ kaj „Autoro“, (la „u“ kun kaj sen hoko - supersigno). De Kocourek mi ricevis sen supersigno nur: verdan-argentan, verdan-oran kaj ruĝan-rozkoloran markojn. La ceteraj al mi mankas. Do mi mendas de vi po 100 de ĉiuj aliaj „Autoro“ markoj. Estas la jenaj:
 verda sur blanka, verda, flava, rozkolora;
 ruĝa sur blanka, verda, flava;
 blua sur blanka, verda, flava, violkolora.
 Lübeck, 5.X.13 Altestime Dr. AMöbusz “



Jen la (verda sur rozkolora) reliefa Zamenhof-marko kun „hokita u“.
 Dekstre de la kapo: WIEN
 Maldekstre: KOCOUREK
 Videbla nur helpe de lupeo!




Poŝtkarto sendita 1913 el Eutin kun salutoj el la 2a Ligotago de la Nordalbinga Esperanto-Ligo.

Sube kun subskribo de la Ligo prezidanto A. Möbusz.

Traduko de la germanlingva teksto:

Tra muĝantaj ondoj, batalo kaj danĝeroj gvidu nian ŝipeton bona stelo!

Bildo:
Velŝipo, supre en velo: ESPERO



Propaganda bildkarto pri la 6a Germana Esperanto-Kongreso 1911 en Lübeck. Möbusz ĝin organizis.



Kongresa glumarko



Katalogo pri Esperantaj sigelmarkoj.

Prilaborita de Dro Möbusz en Lübeck.

Mallongigoj: E: eldonita; A: aĉetebla ĉe; F: formato; Gr: grandeco de l'bildo (horizontale $\times$ vertikale); Pp: papero; Pr: prezo po 100 pecoj; La prezoj malantaŭ la numeroj kaj koloroj estas la amatoraj prezoj; Ss: subspeco aŭ vario; T: teksto; d, mĉ: dekstre, maldekstre; pf: perforita (ĉentita); s, ms: supre, malsupre.

A. Kongresaj markoj.

I. Universala kongresoj de Esperanto.

1906.

E: Komitato de la IIa Universala kongreso en Ĝenevo. A: ne plu havebla. Vidaĵo de Ĝenevo kun (s mĉ) la Esperantostelo. T ms: IIa Universala Kongreso de Esperanto Ĝenevo. 28. Aŭgusto — 6. Septembro 1906. Reliefe presita sur blanka Pp. F: rektangula. Gr: 47 $\times$ 27 mm, tranĉita.

- | | |
|--------------------------------|-----------|
| 1. Verda sur flava fundo. | 0,500 Sm. |
| 2. Ruĝa sur verda fundo. | 0,500 „ |
| 3. Ruĝa sur blanka fundo. | 0,500 „ |
| 4. Blua sur rozkololora fundo. | 0,500 „ |

1907.

E: La Trio por la Tria. A: ne plu havebla. La ponto de la kolegio St. Johano en Cambridge, rando el Esp. steloj. T s: Tria Universala Esperanta Kongreso, ms: Cambridge, Aŭg. 10—17, 1907. Bildo nigra, T kaj steloj koloraj, Pp blanka. F: rektangula, Gr (inter la steloj) 35 $\times$ 23 mm, pf 14.

- | | |
|---------------------|-----------|
| 5. Nigra kaj verda. | 0.300 Sm. |
| 6. Nigra kaj ruĝa. | 0.300 „ |

1912: Katalogo pri E-sigelmarkoj, de Dro Möbusz, Lübeck (GER)



Jen nia plej aktuala katalogo de Esperanto-poŝtmarkoj

Ĉifoje ne sur papero, sed laŭ nuntempa modo sur durdisko. Kialo por tio estas, ke papera versio fariĝus tro multekosta.

Sur la disko estas notitaj kaj montritaj ĉiuj niaj E-pm-oj kaj ankaŭ tiuj tielnomataj „personigitaj“ aŭ „individuaj“ poŝtmarkoj.

Ĉar ili estas validaj por afranko kaj ofte uzataj. Ne eblas kolekti ĉiujn, ĉar iuj aperis kvazaŭ kaŝitaj aŭ nur en eta kvanto.

Tute ne eblas noti prezojn, ili tro varias en la filatela merkato, kaj aktuale falas pro la tutmonda malkresko de la filatelistaro.

Bonŝanco por ni baz-nivelaj kolektantoj, ĉar ni ne kolektas pro spekulacio, sed por dokumenti nian Movadon.

Niaj ĝisnunaj pm-katalogoj ne plu haveblas... tial ĉi noveldono.

Kaj jam en prilaboro estas katalogo pri poŝtaj E-tutaĵoj! Grandega tasko!

Supozeble ne eblas montri ĉiujn... ekzemple tiujn de Sovetunio, Brazilo, Aŭstrio, ili estas tro multaj kaj ofte ne en nia posedo.

Vi povas akiri la pm-katalogon pere de nia prezidantino, kiu ĝin fin-redaktis kaj distribuas. Vi devus pagi al ŝi ĉ. dek eŭrojn inkl. la poŝtan ekspedon. Ĉ. 20 jam estas for... ĉar rete ni sciigis pri la apero.

Nia kolego F. G. Rössler pri individuaj poŝtmarkoj

„...Jam de jaroj eblas presigi individuajn poŝtmarkojn publike validajn fare de kelkaj diversŝtataj institucioj. Mi longe ne aprezis tian kromeldonadon apud la oficialaj serioj, ĉar tiel ampleksiĝas la kvanto de poŝtmarkoj al ne plu superrigardebla amaso kun duba kolekttindeco. Ja sciante pri diversaj esperantistaj kontribuoj al tiu ĉi branĉo, mi tamen neglektis ĝin. Sed decembre de 2016 mi serĉis plezurigi kristnaske mian edzinon ne nur per la eldonado de pluraj ŝiaj bildproduktoj libre, sed per certa unikaĵo, neniam okazinta. Tial mi alklakis la servopaĝon de la Germana Poŝto koncerne al „Individuaj poŝtmarkoj“. Mirigite, ke eblas elekti eĉ 20 diversajn motivojn por seriopaĝo, mi diligente serĉis kaj prilaboris bildojn konvenaformate precipe pri mia edzino kaj ni ambaŭ. Se fakte eblas aperigi proprajn poŝtmarkojn, tiam oni orgojle mem aperu portrete koverta, same digne kiel reĝinoj, papoj, despotoj, rustaj fervojaj maŝinoj aŭ papilioj malaperontaj. Aparta fieriĝo estis nia bildo sur fiktitiva poŝtmarko, stampita kun pene akirita stampo de nia vilaĝa poŝtburoo, aktuale, post la redukto de la aŭtentaj poŝtcentraloj, parto de loka ĝardenista vendejo. Cetere, la motivo montriĝis en lastjarfina Verda Lupeo.



Post venkado de la ne tre kunlaborema reta mendilo, mi atendis pacience du semajnojn la ricevadon. Postfeste mi humile demandis pri la kialo. Jen la respondo: „Via mendo ne trapasis la kontrolon. Ĝi ne enhavas maldecajn motivojn, sed la montradon de dentumita poŝtmarko aŭ ia stamposigno ne toleras nia sistemo.“

Ree mi sidis kaj plenumis la mendon. Finfine oni liveris antaŭ la 18a de januaro, la naskiĝ-data festo de mia edzino...”

El letero al nia prezidantino



Germanujo antaŭ 1933


1932 Privata alpreso: 21a GERMANA ESPERANTO KONGRESO
PENTEKOSTO 1932 CHEMNITZ

LKK siatempe anoncis, ke aperos filatelaj surprizaĵoj...

Kurioze: La kongresa insigno montris ses-pintan IDO-stelon!

- a) Goethe pm 6 pfenigoj (Michel -kat. GA P 214)
 - b) Friedrich Ebert pm 6 pfenigoj (Michel -kat. GA P 202)
- Vizitu la belan Silezion - Landeck/Glatzer Schneeberg

Oferto en reta aŭkcio (2017) po 200 Eŭroj (Neniu aĉetis!)



a) Goethe



dorse




b) Landeck



dorse



1



2



3

- 1) Tut-pk sendita de s-ano Wei Shan al Laŭlum en Pekino.
La novjara salutkarto aperis okaze de la Jaro de la Muso 1996
kun 12 diversaj dorsflankaj bildoj. Eldon-kodo: HP 15
Private surprisita adresflanke la fama Mao-elldiro pri Esperanto
La ruĝa stampo: „La evoluo de Esperanto 1995.12.9
Seminario de suda parto de Jilin-Provinco“


- 2) Tut-pk sendita de s-ano Li Zhong al Laŭlum en Pekino.
La novjara salutkarto aperis okaze de la Jaro de la Muso 1996
kun 12 diversaj dorsflankaj bildoj. Eldon-kodo: HP 15
Private surprisita teksto:
Feliĉan Novjaron! Ĉion bonan kaj sanon
en la jaro 1996! Korajn bondezirojn al vi!
ZHEJIANGA ESPERANTO ASOCIO 1995-12



- 3) Tut-pk okaze de la jaro de la Tigro 1998.
kun 12 diversaj dorsflankaj bildoj. Eldon-kodo: HP 1998
Supre montrita: HP 1998 - 6
Private surprisita en la ĉina: Koni Esperanton - Koni la Mondon
Dorsflanke: „La dekjara datreveno de la Nanchang-E-Junularo“
Sendita de s-ano Jianjun el Wuhan al Burmeister.



(Nepoŝta) memorstampo pri la E-seminario
Jilin 1995 12 9 Dongfeng



Sur la paĝoj 72-78 videblas
artikoloj pri „Esperanto e Filatelia“,
verkitaj de nia Elda Doerfler kaj
de al mi nekonata Luciano Masolini.
Dankindas pro la aperigo la Elf-Arek-ano Alessandro Simonini.

La lukspapera kajero aperis en Oktobro 2016 en la itala urbo Massa.



ELF-AREK

*Esperanto-Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj*

Prezidantino:

S-ino Elda Doerfler

Via Ghirlandaio 18/1

IT-34138 TRIESTE

>testudo.ts@gmail.com<

Jen mia bankokonto:

IBAN IT35 R076 0102 2000 0001 7452 996 – Banco Posta

BIC: BPPIITRRXXX.

Por: Elda Doerfler

UEA-konto: ELF/AREK = Kodo: elfx/r

Jarkotizo: € 17.00 - Membroj en socialismaj kaj ekssocialismaj landoj: € 15.00

Se vi ne havas aliron al nia konto ĉe UEA, bonvolu kontakti nian prezidantinon.

Nia retpaĝo:

<http://www.kolektado.esperanto.cc/>



**La kongresa glumarko
por nia 102a UK en jaro 2017**

Mezuro: 40x48, memglua,

Bildo: kvinpinta stelo

en ĉielarkaj koloroj

Templo Gyeongbok

(en centro de Seulo.)

Ĝi originas el la 1395a jaro.

La nomo Gyeongbok en traduko:

„Brilanta Feliĉeco“

La kvin koloroj en la stelo signifas

Laŭ la klarigo de la LKK: teron,

ĉielon, orienton, okcidenton,

sudon kaj nordon.